

ESPERANTISTO

ESPERANTYSTA POLSKI

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ

ELDONANTO
WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO.

REDAKTANTOJ
REDAKTORZY

PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.

DANGĜERA LUDO.

Eĉ plej malmulte informita esperantisto scias, kial pereis Volapük. Ne la indiferenteco de la mondo ĝin mortigis; kontraŭe — la mondo akceptis ĝin kun entuziasmo pli granda, ol poste Esperanton. Volapük mortis, ĉar ĝi estis tro malfacila, tro malsimpla, nekapabla al vivo, nekapabla al la rolo de lingvo universala.

Ankaŭ ĉiu, eĉ plej malmulte informita esperantisto, scias pri la okazoj de la jaro 1907 kaj konas la historion de tiu iama apostolo, kiu ruze perfidis sian majstron kaj semis en la esperantistajn vicojn konfuzon. Ido malvenkis ne nur tial, ĉar devas malvenki ĉio, konstruita sur la fundamento de perfido, sed ankaŭ tial, ĉar kompare kun Esperanto ĝi estis malpli perfekta, ĉar malpli simpla kaj facila.

Multaj projektoj de lingvo internacia ekĝermis — kaj pereis abortite aŭ mortis en la suĉaĝo. La severan provon de la vivo eltenis nur unu, la „simpla, fleksebla, belsona, vere internacia“ Esperanto.

La sukceso, la vivkapablo de Esperanto kuŝas grandparte en ĝia simpleco kaj facileco. Atenci tiujn ĝiajn ecojn signifas atenci la vivopovon mem de Esperanto.

Tiu ĉi aserto tute ne signifas, ke ĝi devas esti eterne limigata al tio, kion alportis la jaro 1887.

Esperanto devas evolui kaj povas evolui. Ĝi estas mirinde simila al viva organismo, kiu nutras sin kaj kreskas. Ĝi ĉerpas el la vivodona grundo de la lingvoj naturaj elementojn, kiujn ĝi transformas laŭ sia bezono kaj asimilas.

Tamen tiu ĉerpado kaj asimilado devas konformi al la veraj bezonoj de la lingvo kaj devas okazi „ne tro rapide, ne tro multe unufoje“...

Se patrino, volante akceli la kreskadon de sia infano, ŝtopadus ĝin de mateno ĝis vespero per nutraĵo, dekoble superanta tion, kion la infana organismo povas akcepti, facile estus antaŭvidi la finon: la bela infaneto perdus la vangrozecon, la sanon, kaj eble baldaŭ mem iĝus nutraĵo por vermoj.

De kelka tempo ni observas en Esperantujo la tendencon pluirĝigi la evoluon de la lingvo. Ni vidas kvazaŭ vetkurdon pro novaj vortoj, kvazaŭ konkurson pri tio, kiu povas glori sin per pleja novkreado, kvazaŭ kuradon blindan kun nukrompa rapideco trans montojn kaj valojn.

Kaj tiun facilaniman sporton oni pravigas, asertante, ke tio, kio sufiĉas por proza rakonto, malsufiĉas por la poezio, ke oni ne povas uzi la saman lingvon, por rakonti historieton el ĉiutaga vivo kaj por traduki ĉefverkon de la poezio.

Tamen la vero estas, ke lingvo internacia devas esti por ĉio, aŭ ĝi estos por

nenio. Ĝi ne povas havi kelkajn vizaĝojn. Ĝi devas esti unu, aŭ ĝi ne havas racion de ekzisto. Oni ne rajtas krei apud la komuna lingvo ian dialekton, kompreneblan nur por elektita sekto, lingvaĵon, por kies kompreno necesas foliumi specialajn vortarojn.

Kaj tiuj specialaj vortaroj — kiu decidis pri ilia neceso? Ĉu la instancoj, kies tasko estas unuigadi la evoluon de la lingvo? Ĝi estas afero privata, kiun oni defendas, dirante, ke ja ne ĉiujare la aŭtoro aperigos ion similan. Pardonu, samideanoj! Se hodiaŭ eldonas specialan vortaron ekz. Budapeŝto, kial morgaŭ ne eldonu alian Parizo aŭ Varsovio? Kaj tiamaniere Esperanto, tiu perlo de simpleco, fariĝos eble la plej malsimpla lingvo de la mondo kaj iom post iom nova Babelo kreskos en la sino mem de la lingvo internacia!

HENRIKO GELB.

Henryk Sienkiewicz

(La 50^a datreveno de lia Trilogio)

Antaŭ 50 jaroj sur la kolonoj de iu varsovia gazeto aperis la unua ĉapitro de historia Trilogio, kies efikan influon al la psikologio de la pola popolo kaj ĝia vivo neniu antaŭvidis.

„Ogniem i Mieczem“ (Per fajro kaj glavo) fariĝis la evangelio de la pola popolo en tiu epoko, kiam post malsukcesaj pruvoj forigi la katenojn de sklaveco; rezignado kaj malespero sieĝis ĝian pens-manieron. En la jaro 1883-kiam la gviduloj de la mallibera pola popolo konsilis produktivan laboron anstataŭ romantikaj ribeloj kontraŭ la perfortuloj, kiam tiuj gviduloj pruvis la senhelpemon de la pola popolo — aperigis Sienkiewicz la unuan ĉapitron de sia Trilogio, instigante la Polojn al memfido, montrante al ili heroajn venkojn per entuziasmo, kontraŭ multoble pli grandaj armeoj. „Ogniem i Mieczem“ enspiris en la polan popolon novan kredon en siaj propraj fortoj. Sienkiewicz revivigis la glorajn tempojn de Polujo, la heroajn batalojn kaj venkojn de Stefan Czarniecki, la entuziasmajn kaj oferemajn batalojn de la tuta popolo por la defendo de sia patrolando.

Sed ne nur al batalo instigis la Trilogio — ĝi fariĝis ponto por la malesperu-

Esperanto devas evolui, certe! Kaj la lingva evoluo sendube devas posttiri asimiladon de novaj radikoj kaj formoj. Sed la kriterio de l' akcepto ne estu: „tio kontentigas mian guston“, sed: „tio estas necesa, por esprimi ideojn, alie neesprimeblajn, aŭ esprimeblajn tro artifice“.

Se ni volus sekvi tiun ĉi regulon, kiom da „mornaj“, „sinistraj“, „tristaj“ kaj „obskuraj“ vortoj montriĝus senbezonoj...

Resume, ne kontraŭ la evoluo mi levus mian voĉon, sed kontraŭ tiu neologisma manio, kontraŭ tiu danĝera sporto, kiu, instigante siajn adeptojn al ĉiam novaj lingvaj artifaĵoj, iom post iom forpuŝas Esperanton de ĝia idealo: lingvo internacia, simpla, facile komprenebla por ĉiu.

Lidja Zamenhof.

loj, kiuj nun ekvidis la glorajn tempojn de la patrujo. La Trilogio avertis, ke popolo kun tia historia pasinteco ne pereos — ĝi vivas kaj el dormado vekigis...

Profesoro I. Chrzanowski skribas pri la Trilogio, ke ĝi instruis kanton al miloj da polaj buŝoj kaj koroj, kiuj eĉ la polan parolon jam estis forgesintaj. Se tiu melodio hodiaŭ ludas en la animoj de la Poloj, troviĝantaj ĉie en la mondo, ĝi estas grandparte merito de Sienkiewicz. Neniu pola libro iam ajn estis tiom legata kiel la Trilogio de Sienkiewicz: en Litovujo, Prusujo, Rusujo kaj Ameriko ne unu pola animo, kiu jam estis perdinta sian polecon, retrovis ĝin tute post tralego de la Trilogio. Jes, la meritoj de la Trilogio estas ne dubindaj: ĝi vekis en la pola popolo profundan senton kaj sentimenton por la malnovaj tradicio kaj kulturo, kiujn senĉese rompadis la perfortuloj. Tiujn celojn starigis al si Sienkiewicz en la tempo, kiam la pola popolo vivis en la plej mizera sklaveco, li instigis ĝin al espero, al memfido, al kredo, ke ĝi estis iam forta kaj ne pereos... Sienkiewicz sukcesis: liaj geniece kaj artismo kreis vivan historion kun viva popolo. Epoko, kiu delonge estis for, subite ekvivis. Sienkiewicz ne kreis roma-

najn figurojn, li revivigis la mortintajn heroojn: liaj herooj vivas, ili subite ekagis kaj forte ekparolis al la pola popolo. Ne unu sola fakto okazis, ke pola kamparano faris di-servon por la bon-ŝanco de Skrzetuski aŭ de alia heroo de la Trilogio. Sienkiewicz vivigis la gloran pasintecon de Polujo tiam, kiam la pola popolo ĝemis sub la terura jugo de la sklaveco.

Interesa estas ankaŭ la fakto, ke Sienkiewicz apartenas al la plej konataj polaj verkistoj eksterlande, liaj verkoj atingis rekordan eldon-nombro el inter la polaj verkistoj. Ĝuste nun okazas en Polujo ekspozicio de polaj libroj eldonitaj en fremdaj lingvoj eksterlande. „Quo

vadis“ de Sienkiewicz estis eldonita en 22 ŝtatoj sur la tuta terglobo. La Trilogio estas eldonita en 17 ŝtatoj. Inter la grandega nombro da lingvoj prezentantaj la verkojn de Sienkiewicz ni trovas ankaŭ Esperanton, kiu prezentis kelkajn verkojn de Sienkiewicz al la tutmonda Esperantistaro. Tiu malgranda skizo ne elĉerpas la temon pri la Trilogio kaj ĝia aŭtoro, ĝi tamen montras, ke Sienkiewicz estas la plej populara pola verkisto en kaj eksterlande. liaj verkoj enpenetris en ĉiujn angulojn de la granda mondo, atestante pri la pola verkado kaj kulturo — multe pli antaŭ la akiro de politika sendependeco de Polujo.

Jen la granda merito de Sienkiewicz.

EUGEN ELI.

NIA PROPAGANDO ESTU PLI SERIOZA!

Laste okazis en Kraków kelkaj prelegoj pri Esperanto en diversaj (speciale universitataj) asocioj, kaj unu publika vespero pri lingvo universala. Nia propagando dum ili ne ĉiam estis tute ĝusta. Je margeno de tiuj prelegoj prezentiĝas jenaj rimarkoj:

1. Ni tro ofte troiĝas la facilecon de Esperanto. Estas vero, ke Esperanto estas multe, multe pli facila ol la naciaj lingvoj. Sensencaĵo tamen estas aserti, ke oni ĝin povas ellerni dum kelkaj tagoj. Ellerni lingvon signifas, ke oni ekkonis ĝin tiom, ke flua parolado kaj prezentado de siaj pensoj iĝas neniam malfacilaĵojn. Bedaŭrinde tro multe inter la esperantistoj vere lernis la lingvon nur dum kelkaj tagoj kaj krom balbutado de kelkaj frazoj ili tute ne scias paroli. — La lingvo, kiun oni povas ellerni dum kelkaj horoj prezentas sin por multaj — iomete humore, ĉiukaze ne serioze. Kaj al niaj verdaj propagandistoj oni ofte respondas: „Se vere Esperanto estas tiom facila, mi povas ĝin ellerni dum unu semajno, kiam jam aliaj ĝin konos“. Tiu vidpunkto estas por nia afero plej danĝera, ĉar ĝi kreas veran „circulus viciosus“. Tiamaniere ni neniam sukcesos. Tial pli ĝuste estas akcenti ne la facilecon, sed la universalecon de Esperanto kaj tion, ke ĝi estos unu sola (krom la gepatra) lingvo por internacia interkompreno.

2. Esperantistoj el la tuta mondo kre-

as unu rondon familian. Se esperantisto vizitas eksterlandon, la samideanoj helpas al li tutkore, gastigas lin, unuvorte, dank' al Esperanto oni povas travojaĝi la mondon ne nur facile sed ankaŭ malmultekoste. — Sed ankaŭ tion ni ne tro ofte akcentu. Tio ja estas ebla nur ĝis kiam tiu rondo familia tamen ne estos tro granda. La gastameco certe multe malgrandiĝus, se ĉiuj jam scius Esperanton. Ni pripensu nur: ĉiu eksterlandano — samideano! Tage kaj nokte, matene kaj vespere, marde kaj dimanĉe — eksterlandaj samideanoj! La tempo certe ne sufiĉus. Niaj kontraŭuloj ofte uzas tiun argumenton pruvante, ke la kompleta disvastigo de Esperanto malgrandigos multe (se ne tute) tiun gastemecon. Certe. Sed Esperanto povas krei komunan amikecon kaj solidarecon de la homoj, sen diferenco je nacio, religio, raso (tiom hodiaŭ moderna!) ktp. Pri tio ni atentigu.

3. Dum la diskuta vespero pri lingvo universala unu el malnovaj kaj tre estimataj Krakovaj Esperantistoj diris: „Esperanto estas lingvo perfekta. Sed tamen, se iu elpensus lingvon ankoraŭ pli perfektan, pli facilan, mi ĉesus esti Esperantisto kaj mi tuj ellernus tiun novan lingvon“. Miaopinie al esperantisto estas malpermesate diri tian frazon. Esperanto ne estas lingvo perfekta. Neniu homa verko estas tia. Ĝi estas nur preskaŭ perfekta. Vere povas okazi, ke oni

kreos lingvon iomete pli simplan, pli facilan. Anstataŭ 16 reguloj de la gramatiko ĝi havos nur 15. Sed ĉu n i t i a l f o r l a s u n i a n l i n g v o n, lingvon vivantan, lingvon, kiun jam parolas centoj da miloj? N e.

TADEUSZ RITTNER.

R I M A R K O J.

PENSOJ.

Neesprimitaj pensoj estas plej puraj. Tiom longe, ĝis kiam ili ne estos esprimitaj. En tiu stato certe nur malmultaj nomos ilin pensoj.

Neesprimita penso enhavas ion dian. Ĉu oni povas ĝin kompari kun embrio? Ne, ĝi estas io pli kaj malpli samtempe. Malpli — kiel realaĵo. Se geamantoj kisas sin unuafoje, kreiĝas kvazaŭ en la sama momento infano. Kaj same malmulte reala, kiel tiu „infano“, estas la neesprimita penso.

Sed l' ekstera formo estas por la penso nur io necesa. Oni ne devas pri tio forgesadi. Ĝi estas nur vesto. La penso bezonas tiun eksteran formon por eniri inter la homojn, por povi kun ili interrilati. Kaj ĉiu vesto mensogas. Ĉiu formo havas en si ion de uniformo.

Kial la vesto mensogas? Ĉar ĝi ĉion kovras. La tajloro niveligas diferencojn inter la homoj. La tajloro agas socie. Ne ekzistas en la mondo du samaj homoj. Sed tio ne plaĉas al la tajloro. La tajloro faras sinjoron B. kiel eble simila al sinjoro A., por ke ili pli bone kun si interrilatu. La tajloro estas advokato de l' societo.

ARTO.

Kaj tiel la penso ne havas estantecon. La penso vivis pli frue, ol ĝi komencis vivi. En la kaĝo, aŭ esprimita, ĝi sopiras ĉiam al sia libereco, al tiu stato, kiam ĝi estis ankoraŭ nemakulita.

Kaj el tiu sopiro naskiĝis arto.

Tio, kion vi nomas penso, estas alivestita, makulita, ruza kaj limigita, kaj tial vi estas prava dirante: „Arto ne estas pro tio, ke ĝi esprimu la pensojn“. Sed mi deziras diri: pensojn, kiuj estis antaŭe, antaŭ ilia forpelo el la paradizo. Por tiuj pensoj arto estas la sola esprimilo.

Arto estas nesocia formo por la penso. Pri tio ankaŭ ne forgesu. Sed ne rakontu tion pluen, ĉar vi estus nekom-

Tri prezentitaj ekzemploj montras, ke vi propagandante devas esti pli seriozaj, pli singardemaj. Ni ne troigu, ni diru nur la veron, ĝi estas sufiĉe konvinka. Alie ni donas nur argumentojn al niaj kontraŭuloj.

prenita, kaj eble eĉ ŝtonmortigita. Arto estas nesocia formo.

Ĉiuokaze tajloro estas obstine kontraŭa al tiuspecaj vestoj.

TAJLORO.

Tajloro estas prava de sia vidpunkto, kiel advokato de socio. Kaj li estus prava, se li sciis, ke li mem estas kontraŭa al arto. Sed rigardu, li traktas ĝin principe kun granda respekto... Li konstruas por ĝi sanktejojn el publikaj rimedoj, fondas stipendiojn por junularo dediĉanta sin al ĝi. Li suferas multajn horojn da enuo en ĝia nomo, trinkas je ĝia sano dum solenaj bankedoj kaj parolas, ke ĝi estas „eterna“.

Ni nomu lin ankaŭ plue „tajloro“ kaj parolu pri li sen ironio kaj malamo, ĉar arto havas multon al li por danki.

Sed ĉu arto estas vere eterna?

Eble tio sonas strange: sed ĝia vivo estas plene dependa de tajloro. Malmulte helpas al ĝi, se ĝi ricevas de li stipendiojn, sed li povos ĝin por dekoj da jaroj mortigi, se ĝi estas de li „komprenita“.

Al iuj artverkoj tio povas okazi—plej ofte post ilia naskiĝo.

KULTURO.

El mortigita arto kreiĝas kulturo.

Kulturo estas arto „komprenita“ de socio (aŭ kiel oni ankaŭ diras: ĝi fariĝis propraĵo de ĉiuj edukitaj homoj).

Ĝia rilato al vera, vivanta arto estas tia sama, kiel de esprimita penso al penso virga.

Plej grandaj verkoj de renesanco, plej gravaj poemoj de pasintaj jarcentoj fariĝis kulturo.

Sed tio ne malaltigas ilian valoron. Malgraŭ tio ili povis antaŭe aparteni al vera arto aŭ en estonteco denove reveni al ĝi.

Ilia estonta reviviĝo dependas de tio, ke oni ilin ankoraŭ foje krucumu kaj enterigu.

Tradukis Baroko.

JERZY ŻULAWSKI.

LA VENDITA ANIMO.

Iafoje ŝajnas al mi, ke mia animo ne apartenas al mi. Mi vendis ĝin kaj mi ne havas jam la rajton fari kun ĝi, kio plaĉas al mi. Oni aĉetis ĝin kaj mi eĉ ne sciis pri tio; oni donis al mi moneron en la manon, mi ĝin perdis — sed la animo jam ne estas mia.

Iam tio estis, iam, tre... Kiom da jaroj?

Mia Dio — ĉu ĉiuj jaroj kaj ĉiuj horoj estas egalaj?

Kelkaj estas tre longaj.

Tio estis mia unua amo...

Ni amis nin tre... Ĉu mi rakontu la okazintaĵojn de la unua amo?

Per strangaj ili iris vojoj kaj strange finiĝis. Hodiaŭ mi scias: tio estis malsana amo!

Iutage, irante matene al ŝi, mi ekaŭdis je la ŝtuparo ĥoban sciigon: ŝi prenis nokte venenajon.

LEONO VIENANO.

LINGVA ANGULO

(Daŭriĝo).

12). La elasteco en la formado de la adverbo en Esperanto estigas tri lingvajn avantaĝojn grandsignifajn, nome: I. maskiĝas vorto kun nova nuanco, ekz. morgaŭ — morgaŭe (vidu P. E. Nr. 12, 1933). II. mallongiĝas la formo, ekz. aust. „en somero“ — somere. III. kreiĝas nova uzebleco de la koncerna vorto ĉe gramatikaj formoj, kiuj ne allasas meti ĉe si la saman vorton sen adverba finaĵo, ekz. „Li havis ĉirkaŭ dudek jaroj“ aŭ „Li havis ĉirkaŭe dudek jarojn“: en ambaŭ frazoj estas allaseblaj egalrajte ambaŭ formoj: la prepozicia (ĉirkaŭ) kaj la adverba (ĉirkaŭe). Sed: Li estis ĉirkaŭe dudekjara — en la jena frazo uzo de prepozicia formo estus erara (kion mi trovis en libro ĝenerale bonstille tradukita) kaj nur la adverba formo estas korekta ĉar prepozicio antaŭ adjektivo estas absurdo.

Samtiel: Li sidas apude.

13. „Kutimi“ kaj „kutimiĝi“ havas diferencajn nuancojn, nome „kutimi“ signifas: ion fari pro inklino, ekz.: Mi kutimas skribi rapide. „Kutimiĝi“ signifas: akiri aŭ peni akiri ian inklinton, ekz. Mi kutimiĝas skribi rapide. Tial „kutimiĝi“ allasas la sufikson „al“ kaj la kunmetaĵo „alkutimiĝi“ estas korekta (la prepozicio „al“ indikas direkton por atingi

Mi estis kulpa je tio.

Mi kunvckis kuracistojn kaj ili savis ŝin.

Kaj poste!

Poste denove estis mirindaj aferoj kaj hodiaŭ mi eĉ ne scias, en kiu parto de la mondo ŝi troviĝas nun.

Sed la animo mia jam ne apartenas al mi; ŝi aĉetis ĝin en tiu memorinda nokto — por la prezo de sia vivo. Kaj ŝi rajtas fari kun mia animo, kio plaĉas al ŝi. Ŝi rajtas vundi ĝin per sopirado, rajtas turmenti per riproĉoj. Ŝi rajtas, ĉar ŝi aĉetis mian animon.

Kaj mi ne havas eblecon elĉeti reen mian animon. La plej granda pago, kiun mi povas doni, ne egaliĝos al la prezo de ŝia vivo, kiun ŝi oferis al mi.

Tradukis el pola J. Ŝapiro.

ion), sed „alkutimi“ uzita iuloke estas evitinda, kio estas konklude komprenebla el la supre klarigita.

14). La spirito de lingvo restas ĉiam sensanĝa, la lingvo mem evoluante fariĝas pli elasta, multaj esprimoj pezaj cedas lokon al aliaj pli sukcesaj, iaj formoj malaperas preskaŭ tute, montriĝinte malmulte vivkapablaj.

Tia estas la sorto de la prepozicio „je“. Komence abunde uzata iom post iom maloftiĝadis, anstataŭigata per aliaj prepozicioj aŭ aliaj formoj gramatikaj. Ĉi tiu evoluo komenciĝis jam en la verkaro de Zamenhof, kiu rimarkis kaj eksektis per sia mirinda lingvosento la balaston kaj la „fiaskon“ de ĉi tiu prepozicio. Memkompreneble, ke foje „saĝiĝinte“ ni farus sensencaĵon, revenante al la antaŭaj mallertaj formoj. Komence Zamenhof skribis: „punkto de vidado“ — tute neniu preferus ĉi tiun esprimon ol la flekseblan „vidpunkto“, kiun kreis poste Zamenhof mem.

La prepozicio „je“ devas esti uzata nur en esceptaj okazoj, kiam alia eliro ne ekzistas. Do, tia esprimo kiel: „Li prenis je siaj ŝultroj malfacilan taskon“ — uzita iuloke — devas esti nepre anstataŭigata per: „Li prenis sur siajn ŝultrojn malfacilan taskon“ ĉi tie la

prepozicio „sur“ estas memkomprenebla kaj uzo de „je“ devas esti rigardata stranga, se ni forgesos pri la komenca uzo de fiaskinta „je“. La uzo de „sur“ en la menciita okazo estas tiel logi-

ka, ke ĝi ekskluzivas iujn ajn aliajn prepoziciojn. La uzon de „je“ en similaj okazoj oni povas konsideri malevoluo.

Ni konsideru tion.

PRI ĈIRKAŬ KIEL ADVERBO.

En Pola Esperantisto p. 165, Dec., 1933 tiu funda Zamenhofa studanto Leono Vienano diras pri la frazo: „Kiu daŭris ĉirkaŭ du horoj“, ke la nomativo „jaroj“ estas korekta, tial, ĉar ĝi sekvas ĉi tie post la prepozicio „ĉirkaŭ“ (regulo 8 de la Fundamento) kaj ne estas dependa de la verbo „daŭri“.

Tiu aserto estas erara, ĉar en la donita frazo „ĉirkaŭ“ ne estas prepozicio sed adverbo. Stamatidis, en sia Nova Gramatika Libro, diras, ke „kiel en la naciaj lingvoj, tiel same en Esperanto, kelkaj el la prepozicioj ludas ankaŭ la rolon jen de konjunkcioj: dum, ĝis, antaŭ, antaŭ ol, por: jen de adverbo: ĉirkaŭ, kvazaŭ k. t. p.“ kaj p. 71 donas ekz. „La koncerto daŭris ĉirkaŭ tri horoj“.

Cox, Grammar and Commentary, pĝ. 189, 190, donas la samon, kaj ankaŭ: „Mi volas aĉeti ĉirkaŭ kvar funtojn“. Mair, Kompleta Traktado pri la Prepozicioj kaj pri la Akuzativo, ankaŭ donas: „La koncerto daŭris ĉirkaŭ du horojn kaj finiĝis ĉirkaŭ la meznokto“ (cetere ĝi devas esti, noktomezo). La

unua „ĉirkaŭ“ estas adverbo, la dua — prepozicio. La Plena Vortaro konsilas uzi la plenan adverban formon, kiam „ĉirkaŭ“ servas kiel adverbo: „Li havas ĉirkaŭe 60 jarojn“, t. e., proksimume 60 jarojn.

Sed ne aprobinda estas tio, ke La P. V. ignoras la uzojn de tri el niaj ĉefaj majstroj: „Mi bezonus nur ĉirkaŭ ducent rublojn“ (Revizoro 31/12); „Mi havas ĉirkaŭ kvin rublojn“ (Grabowski, Ŝi la Tria); „Ĉirkaŭ kvin horojn“ (Patroj kaj Filoj, Kabe). En tiuj frazoj „ĉirkaŭ“ ne estas prepozicio sed parto de la nepriza numeralo. Klare estas, ke ni devas rigardi la vortojn „ĉirkaŭ du horojn“ kiel adverbafrazon dependantan de la verbo „daŭri“ — Kiel longe ĝi daŭris? — Ĉirkaŭ-du-horojn, aŭ, proksimume, pli-malpli, ĉirkaŭe, du horojn.

Por lernantoj la demando eble plifaciligus se verkistoj, uzante prepoziciojn kiel adverbojn, ĉiam aldonus la e-finaĵon.

R. Banham,

Melbourne, Aŭstralio.

POLLANDA KRONIKO

VESPERO DE VIENAJ ESPERANTISTOJ EN LWÓW.

Sub Protektorato de Vienaj Esperanto-Societoj kaj Literatur-Artista Komitato sub gvido de nia fama laboranto sur kulturkleriga kampo, s-o Henryk Schnützer, okazis la 4. IV. 1934.

VIENA VESPERO

konsistanta el kanto, deklamado, orkestro kaj mallonga prelego kun lumbildoj.

Simfonia orkestro, sub direkto de Profesoro K. Abratowski ludis muzikaĵojn de Suppé, Strauss, Schrammel kun verve, multe aplaŭdita. Fraŭlino Bożena Czaszkówna kantis ĉarme kaj belvoĉe kelkajn vienajn melodiojn, akirante laŭdojn de aŭskultantaro.

La konata drama artisto S-ro Dr. Teodoro Akrzyński deklamis majstre po-

emojn, prelegis leteron de reĝo Jan Sobieski el Wien al sia edzino Marysieńka kaj laŭtleĝis legendon pri la deveno de la Stefana Turo de Wien (laŭ viena Radjoparolado de S-ino Siedl).

Multaplaŭdata estis la fama Viena Delegitino de Esperanto Societoj, Fraŭlino Minuška Mantel, kiu en agrablega maniero klarigis lumbildojn de belega Wien kaj ĉirkaŭaĵo, ĉefe en Viena dialekto parolante, per tio kaŭzante simpatian alternon de l' programo.

S-ro Józef Finkler ĉarmis per belaj Schubertkantoj.

La plej brila parto de la abunda programo estis la ĉarmega 19-jara Viena operetkantistino Mia Haendel, kiu kun viena temperamento kaj verve kantis en

viena dialekto, krome, kiel surprizon, kanton pollingvan „Walc Cesarski“, komponaĵo de Lwów'ano **Alfred Schuetz**, kiu pianakompanis.

La multnombra, inter ili la Aŭstria Konsulo S-ro **Vorner** kaj la Prezidanto de la urbo, Ĉefdirektoro de Polskie Radio, S-ro Ing. **Witold Scazighino**, krome multaj aliaj eminentuloj, aŭskultantaro vigle akklamis ĉiujn partoprenantojn, kiuj bonege reprezentis Wien, la urbon ĉe blua Danubo.

LA VESPERO HAVIS ĈEFAN PROPAGANDCELON.

Oesterreichisches Konsulat
(Aŭstria Konsulejo).

Lwów, la 11. de Aprilo, 1934.

Lwów
Zl. 1065.

Al la
Literatur- Artista- Komitato de Lwowaj
Esperanto- Rondo
Lwów
ul. Bourlarda 15.

Mi havas la honoron, esprimi al la aranĝantoj de la VIENA VESPERO, okazinta la 4. IV. 1934, mian plej koran dankon.

Multon oni denove organizis, por aliri novajn adeptojn kaj simpatiulojn al mia kara Patrujo.

Mi havas la speciale agrablan taskon,

SVEDA VESPERO EN WARSZAWA.

La 22. III. 1934 en salonoj de Pola Touring-Klubo (Warszawa, str. Kredytowa 5) okazis granda Sveda Vespero sub protektorato de Sveda Ministro en Warszawa, S-ro Einar Hennings. La Vesperon aranĝis Esperanta Sekcio de Pola Touring-Klubo okaze de la 26-a Univ. Kongreso de Esp. en Stockholm. La iniciativo kaj la ĉefa parto de laboro en aranĝado de la Vespero apartenas al nia fervora kaj energia sam-ino f-ino Halina Weinstein, sekretariino de la Esp. Sekcio.

La Vesperon partoprenis multaj anoj de Sveda Legacio en Warszawa, reprezentantoj de Pol-Sveda Societo, de Studenta Rondo de Svedlando-Amikoj ĉe Studenta Asocio de Internacia Alproksimiĝo „Liga“, de Pol-Sveda Komerca Ĉambro kaj de sveda kolonio en Warszawa, kelkaj polaj altranguloj kaj multa, ĉirkaŭ tricentnombra, ĉeestantaro.

ĉi-okaze esprimi al la Organizantoj la profundan dankon de la AŬSTRIA AMBASADOREJO.

Estos al mi plezuro, sciigi la sinjoron Ministron Hoffinger pri la bonsukcesa aranĝo kaj mi afeble petas, ke vi bonvolu enmanigi al mi la koncernajn notojn de l' gazetaro.

La Ĝeneralkonsulo
Vorner.

La 16. III. okazis nia Revuo Esperanto-Pola kun granda sukceso. Multegaj gastoj ĉeestis kaj ĉio estis tondre aplaŭdata. La polan parton kun skeĉoj aranĝis nia lerta kaj sperta f-ino Mgr. Rena Silber kaj s-ro Altstock. — Belege deklamis f-ino Rena Silber, Lena Frucht-Neumannowa, Lola Blank; multe plaĉis la skeĉo „Esperanto en Zamarynów“ verkita de Mgr. Rena Silber, teatraĵo kun granda propagando por nia lingvo. — S-ino Lena Neumann ravis la aŭskultantojn per skeĉo Esp. memverkita „Esperanto - Radioj“, en kiu partoprenis jenaj fervoruloj: Lena Neumann, Lola Blank, Miruška Mantel Nusia Pomeranc, S-roj Altstock, Herr, Mann, Dreifinger kaj nia plej juna Esp-isto Zaleski. Partoprenis belega muzikkvarteto de konataj artistoj Dr. Tadlewski, Horowitz, Markus, Sack. — Entute: ĉiuj prezentiĝis perfektaj aktoroj.

La granda salono estis dekoraciita per sveda, pola kaj esperanta flagoj, sur kies fono pendis portretoj de Sveda Reĝo, Gustavo V., de Pola Respublikestro S-ro prof. dr. Ing. Ignacy Mościcki kaj de Unua Marŝalo de Polujo Józef Piłsudski. Malfermis la Vesperon la mondkonata estinta Pola Ministro de Eksterlandaj Aferoj, S-ro senatano August Zaleski. En sia tre interesa parolo li evidentigis signifon de Esperanto por Polujo dum antaŭmilita periodo de pola politika mallibereco. Poste parolis d-ro Wilhelm Robin, prezidanto de la Esperanta Sekcio. Klariginte la celon de la Vespero, li dankis al S-ro Ing. Wiesław Modzelewski, prezidanto de P. T. K., kaj al S-ro Leon Wodziszawski, direktoro de P. T. K. por helpo kaj vigla partopreno en aranĝo de la Vespero; al Sveda Ministro S-ro Einar Hennings, anstataŭita de la sekretario de la Sveda Legacio S-ro Eric

von Post, por akcepto de la protektorado; al Pol-Sveda Societo, al ĝia prezidanto S-ro Ministro Bertoni, vicprezidanto S-ro Pawlikiewicz kaj precipe al S-ro Konsilanto Wyszyński, kiu ne nur helpis per bonaj konsiloj, sed mem partoprenis aktive la programon; al Studenta Rondo de Svedlando-Amikoj ĉe Studenta Asocio de Internacia Alproksimiĝo „Liga“, kies prezidanton anstataŭis S-ino Halina Harmsene-Stürtz; al ĉiuj artistoj, kiuj helpis efektiviĝi bone la Vesperon; al la Organiza Komitato kaj precipe al la senlaca, fervora samideanino H. Weinstein.

Ekparolis poste la sekretario, S-ro Eric von Post, ĝojante, ke la 26-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Stockholm, kiu tutkore kaj inde akceptos eksterlandajn gastojn.

En la nomo de Studenta Rondo de Svedlando-Amikoj tre interese kaj rave parolis ĉarma f-ino Harmsene-Stürtz. Ŝi deklaris la pretecon de la Studenta Rondo partopreni la laboron de la Esperanta Sekcio sur kampo de reciproka alproksimiĝo de sveda kaj pola socioj, substrekante tre gravan por tio valoron de Esperanto. Poste sekvis interesa prelego de S-ro konsilanto Bronisław Bohdan Wyszyński pri Svedlando kaj ĝia ĉefurbo Stockholm. Kelkajn vortojn pri Internaciaj Kongresoj de Esperanto diris al la publiko S-ro Juljan Jarecki, D-ro Róbin sciigis pri la ĝisnunaj rezultoj de la Vespero: en sveda urbo Visby estas aranĝota Pola Vespero kaj Estona Touring-Klubo estas preta okaziĝi polan turisman ekspozicion — kaj la unua parto de la programo finita.

Dua koncerta parto konsistis el belaj

pianludoj de S-ro Aleksander Hurwicz (Paderewki — Legendo, Chopin — Mazurko cis mol, Liszt — XI rapsodio), el tre belaj kantoj de S-ro Wyszyński („Sverige“ — svedlingve, svedaj popolkantoj-esperantlingve), el esperantlingvaj recitaĵoj de S-ro Jarecki (Fröding-Priarta teorio, Nikander-Ondoj) kaj fine el karakterizaj kaj tre malfacilaj plastikaj kaj popolaj soldancoj, majstre kaj talente plenumitaj de altarta dancistino S-ino Paula Nireńska.

La gastoj kun intereso vizitis la belan turisman ekspozicion pri Svedlando, Estonujo kaj Finnlando. La vere belegaj murafiŝoj „Bonvenon al belega Svedlando“ kaj „Visby — la urbo de rozoj kaj ruinoj“; la fotografiaĵoj, prezentantaj Laponujon, Stockholm, Finnlandon — milagan landon kun siaj grandiozaj lagoj kaj arbaregoj, malgrandan, sed efektive vidindan Estonujon kun ĉarma mezepoka Tallinn; multaj interesaj gvidlibroj. — Ĉio ĉi frapis okulojn de ĉeestantoj. Oni disdonis multe da diversaj broŝuroj kaj prospektoj pri tiuj ĉi tri landoj.

Menciinde, ke la belan ekspozicion aranĝis f-ino H. Weinstein, al kiu helpis en laboro s-roj Dro Al. Stern, H. Krawczyk kaj J. Łapiński.

La Sveda Vespero estis plena de impresoj kaj postlasis neforgeseblajn rememorojn kaj dankon al ĝiaj organizintoj. Pola Touring-Klubo kaj ĝia Esperanta Sekcio meritas tutplenan gratulon kaŭze de la granda kaj belega Vespero. Aliaj Societoj kaj Asocioj havas bonan kaj sekvindan ekzemplon de vere laŭdinda laboro.

B. S.



SPORTO KAJ TURISMO



*Ĉiuj al Stockholm la ĉarma ĉefurbo de Svedujo,
al la XXVI Universala Esp.-Kongreso.*

La XXVI Universala Esperanto-Kongreso okazos ĉi-jare de la 4—11 de aŭgusto en Stockholm, la t. n. „Norda Venecio“.

La situon de Stockholm oni komparas al tiu de Konstantinopol kaj la enveturo flanke de Baltika maro similas la eventuron trans la rivero al Sidney aŭ trans diversaj japanaj riveroj. La ĉefurbon, kiu havas 500.000 da loĝantoj la svedoj nomas „Malara Reĝo“, sed tiu

flata nomo ne tute estas prava, ĉar Stockholm estas ankaŭ reĝo de Baltika maro, ĉar ĝi kuŝas sur la insuloj kaj duoninsuloj de la Malar-lago kaj ĉe ĝia enfluejo en la Baltikan maron. Ĉirkaŭ tiu ĉi enfluejo situas la urbocentro, inda atenton de la vizitanto. La enveturo al Stockholm flanke de la maro daŭras kelkajn horojn kaj estas inda de admiro kaj laŭdo. Unu el la plej grandaj allogaĵoj de Stockholm, krom la urbocentro, situ-

ta ĉirkaŭ la reĝa palaco, estas ĝia belega ĉirkaŭaĵo. Nur ne multaj grandaj urboj tiel senpere trairas de dense konstruitaj stratoj al libera spaco, al variigita naturo, lagoj, montoj kaj arbaroj kovrantaj la teron kaj insulojn. Ĉarme aspektas tia natur-varieco precipe dum la somer-noktoj por homo impresigema je natur-beleco. Kiam la noktoj fariĝas mallongaj, la urbo speguliĝanta per siaj lumoj en la akvo disvastigas ĉarman aspekton. Ne mankas krome en la ĉefurbo muzeoj, bildo-galerioj, monumentoj kaj ĉarmaj ekskurso-lokoj; ne mankas cetero, luksaj hoteloj, restoracioj kaj kafejoj. La Stockholmanoj kaj entute la svedoj kutimas al komforto.

Stockholm estas la plej granda sveda import-haveno, kaj Göteborg okupas ĉefan lokon de eksport-haveno. Stockholm estas ankaŭ grava industria centro kaj havas multajn industriajn entreprenojn tiel en la urbo mem, kiel ankaŭ en la ĉirkaŭaĵo. La ĉefurbo de Svedujo, priskribita de diversaj poetoj, en kiu ĉiu alilandano estas kvazaŭ hejme, en la urbo de laboro kaj samtempe senzorga amuzo, en la urbo de historio kaj moderna vivo, kunvenos ĉi-jare adeptoj de la Verda Stelo el proksimaj kaj malproksimaj lokoj sur la tero, kaj partoprenos en la granda solenaĵo, manifestante siajn sentojn por la ĝenia kreinto de la lingvo Esperanto, la Majstro Zamenhof.

Kiu ĉeestis Esperantan Kongreson kaj vidis la kunvenintajn centojn, da delegitoj de 30—40 nacioj, kiu partoprenis la kongres-aranĝojn kaj imponajn manifestaciojn de la diverslanda esperantistaro, kiu povas esti fiera pri siaj ĝisnunaj atingoj, kaj tiuj, kiuj volas ĝui estadon en Svedujo — belega turisma lando, tiu devas veturi al la Universala Esperanto Kongreso en Stockholm, ĉar veturo kaj vizito de Svedujo donas al la vizitanto multajn impresojn kaj agrablajn travivaĵojn; la Kongreso mem estas tre interesa aranĝo, diversmaniere variigita, kaj ĉiam estas impona kaj brila. Denove dum la XXVI Esp. Kongreso ni konvinkos ĉiujn pri la viveco kaj brila estonteco de Esperanto por la homaro. Esperanto estas nobla ideo de paca kunvivo de ĉiuj nacioj, sublima celado al unuigo de la homaro. Esperanto malfermas al ni la tutan mondon, ĉar ĝiaj adeptoj troviĝas ĉie.

Pro la proksimeco al Polujo certe multaj polaj samideanoj ĝin partoprenos kaj ekkonos la belan Svedujon, en kiu ĉiu provinco havas siajn karakterizajn ecojn, ĉirkaŭaĵojn, artitekturon, nac'ajn vestojn, kaj eĉ malsamajn morojn.

Dum la XXVI Univ. Esp.-Kongreso en Stockholm ni ekkonos la ĉarman, kulturen Svedujon, kaj samtempe la popolojn de preskaŭ la tuta mondo.

Oskar Berman.

Ni ricevis jenan leteron:

„La konata pola profesoro Cybichowski antaŭ kelkaj semajnoj en Berlin publike diris la jenon:

„La popoloj devas lerni pli multe interŝanĝi siajn jurajn ideojn. Per tio estos atingebla pliprofundigo de la juraj ideoj kaj revigliĝo de la praktika juro. Ni, popoloj, estas reformantaj la tutan juron kaj en ĉi tiu fako, same kiel Germanujo, estigis novajn ideojn. La evoluo de la

tuta juro.. estas observata de la polaj scienco kaj klerularo kun plej granda intereso“.

Ĉi tiuj vortoj de unu el viaj plej konataj scienculoj instigis min verki je via dispono la jenkunan malgrandan artikolon pri temo nuntempe tre aktuala en la germana leĝoprudenco Eble vi havas por ĝi intereson en via Pola Esperantisto.

Plej estime!

Fr. Francke, advokato, München.

PRI NOVA, GERMANA KRIMINALJURO

Unu el la ĉefaj taskoj de la nova, germana kriminaljuro estos garantii efikan protekton de la popolanaro kontraŭ krimaj malutiluloj kaj nepre privilegii la interesojn de socio malfavorante deliktularon. La ĝisnunaj leĝoj devis konduki al malhardiĝanta batalo kontraŭ krimoj,

al malenergiiganta kriminaljusteco, fakttoj ofte priplenditaj en la lastaj jaroj. La nova leĝo de la 24. XI. 33 klare forlasis ĉi tiujn tendencojn. Ĝia fundamenta ideo en la fako de la kriminaljuro estas rebonigi la malatentitan sekurigon kontraŭ ili kaj havigi al la kriminaljusteco

batalilojn pli fortajn kaj pli efikajn ol ĝis nun kontraŭ la krimularo komune malutila.

La nova leĝo ekbatalas en du manieroj: kaj preskribante punojn kaj enkondukante disponojn por sekurigo de publiko kaj por rebonigo de krimfarintoj. Ĝi minacas danĝerajn kutimkrimulojn je punda aresto; ĝi kreas (en § 245a St GB) novan delikton, nome la punendan posedon de ŝtelinstrumentoj. Kiel novajn sekurigajn disponojn la leĝo enkondukas la kastron de danĝeraj seksatenculoj kaj la malpermeson de profesi-praktikado.

La leĝo reformas la supozojn por mensa respond-malkapableco kaj enkondukas

la koncepton de netuta (subnormala) respond-kapableco; ĉi tiu estas kaŭzo por laŭjuĝa ordono pri restigo en kurac-kaj fleg-ejo kaj por malpliigo de puno. Speciale gravaj estas la transirigaj (eble „intertempaj“ — Red.) preskriboj, kiuj permesas kontraŭ jam kondamnitaj postajn ordonojn pri sekuriga arestado kaj kastro.

La leĝo do disponigas kriminaljuĝiston pri fortaj rimedoj, por ke li povu efike kontraŭbatali krimojn, kaj konfidas al li novajn metodojn, por ke li protektu la popolanaron kontraŭ komune danĝera deliktularo.

Dr. oec. publ. Dr. jur. F. Francke,
München, Germ.

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

Viena konferenco 19—24 majo 1934. Federacia Ministerio por Komercio kaj Trafiko (varboficejo por fremdultrafiko) dissendis al ĉiuj societoj belegan propekton invitantan al la Viena Konferenco. Aliĝis jam el multaj landoj ministerioj, foiroj, komercaj ĉambroj, ktp. Samideanoj! Se vi ne povas mem partopreni la Konferencon, sendu nepre konsent-telegramon aŭ leteron al la adreso: Wien I. Neue Burg.

Esperantista teatro. Sveda reĝisoro Sandro Malmquist ekdecidis viziti kun sia 15-persona teatra grupo kelkajn eŭropajn landojn por prezenti verkojn de Shakespeare. La grupo vizitos Tallinn, Riga, Warszawa, Kraków, Bratislava, Praha, Budapest, Wien, Malmö, Göteborg. Kiel solan lingvon de la prezentaĵoj la geaktorj elektis Esperanton.

Esp.-Libroj en ŝtata biblioteko de Hindaĉinujo. La Centra Hindaĉina biblioteko en la urbo Hanoj aĉetis multajn Esperanto-lingvajn librojn beletristikajn kaj sciencajn.

Esperanto-kursoj kaj rubrikoj en naciaj gazetoj. Laste komencis presi esp.-kurson latva gazeto „P. T. Dzive“ (Poŝtista kaj telegrafista Vivo) kaj norvega infangazeto „Norsk Barneblad“. — La granda ilustrita revuo nederlanda „Rusland van Heden“ klarigas ĉiujn siajn ilustraĵojn ankaŭ per esp.-lingvaj subskriboj. — Ĉeĥa gazeto „České Slovo“ kaj du gravaj hindaĉinaj gazetoj

„Ban-tre“ kaj ĉiutaga „Ngo-Bao“ enhavas konstantajn Esp.-rubrikojn.

II. Internacia Esp.-kurso por geoficistaro de P. T. T. Post la grandsukcesa pasintjara kurso, la Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt-kaj Telegraf-oficistoj (ILEPTO) kaj la Internacia Cseh-Instituto en kunlaboro kun la Ĝenerala Direkcio de la Nederlanda P. T. T. organizas la duan internacian kurson de Esperanto por la geoficistaro de P. T. T., kiu okazos en la Esperanto-Domo en Arnhem (Nederlando) dum la tagoj 2-a—12-a de julio 1934.

Esperanto-stando ĉe la Foiro de Milano. La Estraro de la Internacia Specimenfoiro de Milano destinis la standon 732 por la ĵus okazinta (12-a—24-a de aprilo 1934) foiro, kie okazis ekspozicio de Esperanta materialo kun deĵoro de esperantistaj informantoj.

„Stenografita Instituto Tutmonda“. Ĵus oni fondis „Stenografan Instituton Tutmondan“ propagandantan la simpligitan stenografion esp. „Metagrafio“. Por la Esperantistaro postrestas tamen demando, kia estas sinteno de supra citita Instituto al „Intersteno“, ankaŭ internacia stenografia sistemo? Ĉu ankaŭ sur la kampo de stenografio estas bezona unuecigo?

XIV. Internacia Kongreso de SAT. La 14-a Internacia Kongreso de SAT okazos en Valencio (Hispanujo) la 3—8 de aŭgusto 1934. Adreso de organiza Kongresa Komitato: Horno del Hospital, 12, 1, Valencio.

La Esperanto-stelo en episkopa blazono. La nova ĉeĥoslovaka katolika episkopo Dro Antono Eltschkner metis la esperantistan insignon (kvinpintan stelon) en sian episkopan blazonon, kiel simbolon de la internacia frateco kaj paco.

Biskvita fabriko produktas „Esperanto-kekson“. Jus aperis sur la merkato nova fabriko sub la nomo „Esperanto-Kekso“, produktata de la biskvito-fabriko „Karolina“ en Osijek (Jugoslavio).



TEATRO KAJ FILMO



„FAMILIO“ DE ANTONI SŁONIMSKI.

De kelkaj monatoj polaj teatroj prezentas faman jam ankaŭ eksterlande teatraĵon de Słonimski. Laŭdoj kaj mallaudoj falas sur la kapon de la aŭtoro, depende verdirante plej ofte de tio, al kiu politika partio apartenas la recenzisto.

Mi la „Familion“ nek laŭdas, nek mal-laŭdas. Ĝi devis esti skribita, kaj ĝuste ĝi, devis esti skribita en Polujo. Je laŭdo de la aŭtoro, oni devas nur diri, ke li, kiel unua, eksentis „ion, kio pendis en la aero“, kaj ke li elektis formon de la dramo. „Familio“, mi ripetas, devis esti skribita, ĉar la akcidentoj, partioj kaj politikaj opinioj en ĝi prezentitaj postulis tion per si mem. Kaj verki ĝin povis ĝuste Polujo, kiu jam per sia geografia situo ludas rolon de bufro inter Rusujo kaj Germanujo, ni diru pli aktuale, inter Sovetunio kaj Hitlerlando. Kaj ĉar la bufro mem ankaŭ ne estas senkolora, ekestas bonega observpunkto prezentanta la batalon de du koloroj tra prismo de tria.

Sinjoro Lekcicki, nobelo de post praaĵoj, malriĉiĝas; lia filino, volante savi la havaĵon kontraŭ kompleta ruiniĝo anonciĝas pere de gazeto, ke en la Lekcicki-bieno estas lueblaj ĉambroj kun pensiono. Ŝi faris ĉion ĉi en sekreto kontraŭ la patro, kiu okupiĝas plue per siaj fantaziaj inventoj, dismetado de horloĝoj, ktp.

Dank' al la anonco alvenas la bienon malgranda, sed konforma societo. Venas do sinjoro Kaczulski, nacidemokrato el Varŝavo kun edzino, stulta ansereto; reprezentanto de „Nova Germanlando“. Hans, grava hitlerana figuro, por elserĉi ĉi „tie siajn praulojn ĝis tria grado (rigardu la verdikton de „Führer“ pri pureco de la raso): venas fine sinjoro starosto kaj vojvodo, volante prepari loĝejon por vizitanta Polujon soveta eminentulo, Lebensohn (komisaro Radek nomiĝas Lebensohn kaj devenas de suda Polujo). Tie la komedio enhavas multajn humorajn momentojn, ĉar la aŭ-

toro, kun propra al li kuraĝeco, kontrastigas la rilaton de vojvodo koncerne al komunistoj „lokaj“, al tiu koncerne al komunistoj „eksterlandaj“. La samo okazas, kiam tiu reprezentanto de la registaro, renkontinte la hitleranon Hans, komence forte lin atakas, kiam tiu malkovris sian hitleranan pensmanieron, kiam tamen la vojvodo ekscias, ke Hans estas germana civitano, li ŝanĝiĝas je diplomato kaj afabla diskutanto.

Kaczewski, kontaktinte kun Hans, komencas krei planojn pri enkonduko de nacisocialismo en Polujon, kaj forveturas Varŝavon por venigi por tiu celo sian partian amikon.

Intertempe evidentiĝas, ke Hans estas filo de loka juda muelisto, Rosenberg. Tiu fakto estis por la juna hitlerano katastrofo; nun li ja ne povas reveni Germanujon. En la atmosfero de pola bieno Hans komencas revii pri paco kaj trankvilo, kaj ne pri S. S. kaj S. A. Li forĝegas pri disciplino kaj ordonoj, li ligas ĉiam pli sian estontecon kun Polujo.

Preskaŭ samtempe komisaro Lebensohn ekscias, ke li estas needza filo de sia patrino, judino, kun sinjoro Lekcicki, do, ke li ne devenas el proletaro, kiel tion skribis sovetaĵ enciklopedioj, sed filo de pola nobelo.

Dum la prezentado aŭdiĝas frazo, kiu klarigas la titolon de tiu teatraĵo: „Oni ne devas tro impete kontraŭbatali la homfraton, ĉar fine ni ĉiuj estas pli aŭ malpli parenĉigitaj“.

La komedio estas pli feljetono ol teatraĵo. Ĝi prezentas ne homojn, sed figurojn. Eble post kelkaj jaroj, tiuj figuroj malaktualiĝos; sed nun ili interesas, ili prezentas la vivon. **Ryszard Linkowski.**

POLUJO ANKAŬ HAVAS INFANAN „BANDON“.

Ĉiuj konas la Hollywoodan infanan „Bandon“, kies anoj tiel ofte amuzis nin en diversaj filmoj. Similan geinfa-

nan aktoran grupon kreis f-ino Aniuta Wachsmann en Kraków. La grupo, kiu jam ludis dum esperantista revuo (okaze de Esp. Semajno) preparas nun infanan revuon, kiu estos filmigita.

OKAZINTAĴO

Somero. Warszawa. Saksa ĝardeno.

Suna tagmezo serenigis vizaĝojn de promenantoj.

Panjo! sur nia benko sidas ia sinjoro — babilas malgranda kvarjara knabineto Alinka.

Al ni tio ĉi ne malhelpas, ĉar nia benko estas sufiĉe longa kaj povas sidi kelkaj personoj — respondis la patrino.

Ili alproksimiĝis benkon, sur kiu ili ĉiutagmeze sidadis. Malfortika infano jam delonge uzadis tian sunan ĝuon.

Sur ilia benko sidis juna sinjoro leganta ĵurnalon. Salutinte alvenintajn li legis plue.

Alinka saĝa kaj multimema infano alproksimiĝis al la najbaro kaj ekbabilis — „bonan tagon, sinjoro“.

La najbaro turninte sin al la infano respondis afable: bonan tagon, ĉarma knabineto.

Alinjo! jam estas tempo por ni reveni hejmen — diris la patrino — la suneto jam subiras.

Ĝis revido — Ĝis revido!

Pasis kelkaj tagoj.

Alinka kun sia patrino promenis sur strato Marszałkowska, pririgardante belajn vitrinojn de magazenoj.

— Nu, ni transiru la straton — diris la panjo, kiam ili sin trovis proksime de l' ĉefa stacidomo. — Atentu bone, Alinjo, je droŝkoj, rigardu antaŭ vin, kaj ne forkuru.

Transirante mezon de l' strato ili subite ekaŭdis signalon de droŝko kaj, antaŭ ol ili orientiĝis en situacio, alverturanta aŭtomobilo estis jam tuj apud la infano. Fariĝis grandega krio.

Konsternita Alinka jam estis sub radoj de aŭto, jam radoj tuŝas la infanon, — sed en tiu ĉi momento fariĝis io neatendita jen ies fortaj manoj kaptis rapide la infanon kaj forportis ĝin flanken.

Brave policisto, brave! kriis pasantoj, aplaudante lin forte. Alvenis alia policisto, kiu staris sur la stratposteno ĉe

l' stacidomo, komencis skribi protokolon.

La unua diris al sia kolego kelkajn vortojn kaj entramiĝinte rapide forveturis.

Sinjorino Żarnowska trankviliĝinte iom post la akcidento ekdemandis tuj pri la filineto.

„Ĉi tie mi estas ĉe vi, panjo. Nenio al mi okazis, la policisto savis min“ respondis la infano.

— Ĉu vi vidis tiun policiston, Alinjo?

Jes, panjo, mi vidis lin entramiĝanta, li estas tute simila al nia najbaro el la ĝardeno.

Pasis denove kelkaj tagoj.

Alinka kiel kutime alvenis la ĝardenon kun la patrino. Sur ilia benko jam sidis li kaj legis gazeton. Alinka salutis lin kiel ĉiam kaj komencis ludi.

Post momento Alinka turnis sin al la patrino kaj flustre diris. Panjo, sajnus al mi, ke li estas tiu policisto, kiu savis min sur la strato Marszałkowska.

Pardonu min, sinjoro, mi estas Żarnowska, demandis, la sinjorino, ĉu vi estas tiu policisto, kiu savis la vivon de mia filineto.

Jes, sinjorino, mi estas stratpolicisto Tomaszewski, mi sidadas en la ĝardeno dum libera tempo por ripozi iom.

Mi tre korege dankas al vi, sinjoro, pro tio, mi estas tre feliĉa.

Alinka aŭskultante komprenis ĉion. Rapide ŝi ensaltis la benkon kaj kisis sur vangon la policiston.

Mi plenumis nur mian devon — respondis la policisto kaj legis plue la gazeton.

St. H.

Vortoj de Goethe pri fumado.

La fumado stultigas, ĝi malkapabligas al pensado kaj verkado. Ĝi estas ankaŭ nur por mallaboruloj, por homoj enuantoj, kiuj unu trionon per manĝado, trinkado kaj aliaj necesaj kaj malnecesaj aferoj pretervagadas kaj poste ne scias, kvankam ili ĉiam diras „vita brevis“ (la vivo estas mallonga), kiel ili pasigu la lastan trionon... En la fumado ankaŭ prezentiĝas akra malĝentileco, impertinenta malsocietemo. La fumantoj malbonodorigas la aeron kaj sufokas ĉiun honestan homon, kiu ne povas fumi por sia defendo.

Laŭ Dro Wilhelm Bode „Stunden mit Goethe“ (Horoj kun Goethe). Represita el Svenska Arbetar Esperantisten nro 12/1933.

Sur margeno de agado de Esperanta Sekcio ĉe Pola Touring-Klubo.

Esperanta Sekcio de Pola Touring-Klubo plene meritis ne nur aprobon, sed sinceran, profundan elkoran dankon. Ankoraŭ ne pasis duonjaro de ĝia fondiĝo, kaj ĝi havas jam tre riĉan bilancon de gravaj sukcesoj. Esperanta Vespero (23. XI. 33.) kaj konstanta turisma ekspozicio, Sveda Vespero, kursoj de Esperanto, ĉiuflanka agado, vasta interrilato kun eksterlando, sistemaj sukcesplenaj labor-kunsidoj kaj kunvenoj, ĉiam novaj kaj realigataj projektoj kaj konkludoj, interesigo de pola socio al esperanto, pres-serva agado — jen kelkaj floroj, alĵetindaj al bela kaj impona bukedo de Sekcia agado. Vere, ĝojo kaj plezuro pleniĝas vian koron, kiam vi rigardas la ne grandan, tamen tre laboreman aron da efektivaj Sekcianoj. Kaj, kiel ĉie, tiel ankaŭ ĉe ni devas esti gvidanto. Pli vere gvidantino. Ĉu eble? Jes! Kiu el ni ne aŭdis ankoraŭ la nomon de nia varsovia samideanino — **Halina Weinsteinówna**? Jen ŝi estas tiu **spiritus movens** (moviga spirito) de nia Sekcio. Ĉiam preta labori, ŝi pasigas la tutan tagon por esperanto. Ŝi vivas por ĝi kaj per ĝi. Juste oni enmanigis al ŝi dum lasta kunveno (26. III. 34.) dankleteron de ĉiuj Sekcianoj. **Suum cuique** — jen nia devizo, kvankam antikva, tamen ĉiam aktuala. Esperantistoj povas kaj scias esti dankemaj.

Sed, karaj legantoj, se mi jam surpasis la bonhumoran vojon, permesu al mi resti sur ĝi. La koro ĝojas, kaj vi, esperantistoj, estu almenaŭ pli toleremaj, ol niaj kontraŭuloj. Permesu babilaĉi al samideano, kiu volas vin ankaŭ ĝojigi, kiu volas al vi diri ĉion, kion li nun sentas, pri ĉiuj kaj ĉio. Ni ja organizis sukcesplenan Svedan Vesperon kaj ni rajtas paroli kaj esti aŭskultataj. Do mi revenas al temo. Ne pensu, ke f-ino Halina estas sola en Sekcio. Ni havas ankaŭ nian prezidanton, **D-ron Róbin**, vere li estas agema kaj sindona al nia lingvo. Cetere la nomo estas konata de pratempoj. Malnovaj esperantistoj memoras ĝin bone. Sed la posteno de prezidantoj ĝenerale estas tre... sendanka, ordinare li kolektas la fruktojn de siaj subuloj. Pli malgraba estas jam la ofico de vicprezidantoj. Nia viculo, varsovia starosto (distriktestro), **s-o Trzópek**, magistro de leĝosciencoj, travivas jam pli malfacilan

sorton. Sed malgraŭ tio li neniam laciĝas, eĉ kontraŭe: la malfacilaĵoj instigas lin labori pli energie kaj pli fervore. Kiom da kredo al esperanta movado kaj potenco, kiom da novaj projektoj, oftfoje Jule Verne'aj, li prezentas al ni. Jen li volas fondi komitatojn por diversaj esperantaj altaj celoj, jen li projektas nerealigeblaĵojn, kaj fine li partoprenas nur dume niajn modestajn sekciajn kunvenojn. Sed malgraŭ ĉio, mi ĵuras, ke li estas tre gaja, simpatia kaj tre amikema. Eble mi povos prezenti lin al kelkiuj el vi, karaj legantoj, dum nia Stockholma kongreso. Tiam vi povos konstati mian verdirecon. Alvenu do multnombre al Stockholm!

S-o Antoni Pisarski, juna ankoraŭ, sed jam tre serioza profesoro kaj ĵurnalisto, estas jam konata al vi dank' al unua oficiala komuniko de Esperanta Sekcio de Pola Touring-Klubo, kie vi povas legi lian afablan inviton skribi al li leterojn. Li saĝe aranĝis la aferon. La plej agrabla flanko de korespondado, nome: ricevado de leteroj apartenas al li, kaj respondi devas jam iu alia, verŝajne... la sekretariino. Sed, malgraŭ tio, liaj meritoj por esperanto estas tre grandaj. Estus tre dezirinde, ke vi vidu, kiel li atakas kaj bombardas diversajn redakciojn de ĉiuj, mi ripetas: de ĉiuj senescepte polaj gazetoj per siaj komunikoj, redaktataj en P. A. T. (Pola Telegrafa Agentejo). Kaj la rezulto? La dormintaj polaj gazetoj, kiuj ĝis nun nur tre malofte menciis pri esperanto, vekigis kaj vetkuras, kaj bedaŭrinde, nun, se vi volas, laĉa de esperanto, iomete ripozi kaj foriĝi de ĝi. vi ĉie, en ĉiu gazeto renkontos la elsoviĝantajn antaŭen naŭ konatajn literojn: **esperanto**. La nedankemaj homoj nomas tian servon — ursa. Tamen ni esperantistoj estas pli dankemaj, kaj ni diras: kaŭze de superfluo la kapo ne doloras. Do li bruu plu!

Krome ni havas ankoraŭ — mi parolas nur pri agemaj sekcianoj — unu oratoron. Li ne estas oratoro de naskiĝo (neniu ja oratoras, kiel suĉinfano), sed tamen li estas oratoro. Li ŝatas paroladi kaj deklami. Li deklamas laŭtvoĉe, mal-laŭte, entuziasme kaj malgaje, poetike kaj proze. Sed, se li devas dum la sama

soleno prelegi kaj deklami, tiam li intermiksas la signifon de tiuj ĉi du esprimoj kaj li deklamas legante kaj prelegas parkere deklamante. Diversaj estas kaj neesplorableblaj ecoj de s-o **Jarecki**. Ĉiu homo estas malsama stilo — diras malnova proverbo. Sekrete mi devas konfesi, ke sinjoro deklamisto estas tre homarama kaj parencema. (La lastan vorton mi ne komprenas — Red.).

Kara leganto! Ĉu vi konas bone esperantajn societojn? Jes?! Do vi certe konas ankaŭ la societajn konsilantojn, kiuj laŭnature estas tre singardemaj. Mi asertas, ke ĉiu societo devas nepre havi tian konsilanton. Kaj se iuj estas ankoraŭ sen ili, rapidu tuj akiri ilin. Pensu: kiomfoje ni estus jam pendigataj aŭ ekzilataj sen nia propra konsilanto. Sciate, ĉiu juna kapo estas facilanima kaj povas kaŭzi al societo grandan malfeliĉon. Jen oni lasis en statuto aŭ letero iun punindan vorton, jen vi elektas malĝustan formon, jen vi senbezone citas nomojn de aŭtoroj aŭ de ĉiuspecaj rolplenantoj sur la programinvitiloj! Certe, ĉio povas okazi. Sed por kio estas Sinjoro Konsilanto. Li ĉion plibonigos kaj ekstere nia sekcio estas ĉiam en ordo. La konsilantoj kutime ne estas elektataj. Ili fariĝas tuj — senelekte, senkaŭze. Mi, mem ne scias — kiel? Sed mi ankoraŭfoje atentigas vin, ke li sendiskute estas bezona, eĉ bezonega. Kvankam la maliculoj nomas tian agadon de la Konsilanto: „flego de arto por arto“, (komprenu: flego de opozicio por opozicio) tamen ni, sekcianoj, estas pli subtilaj kaj ni ŝatas nian Konsilanton. Vi demandas, kiu li estas? Divenu!.. Mi preferas silenti. Sed mi vidas, ke vi ne povas diveni? Do mi kuragos kaj diros. Li estas s-o **Tadeusz Szwańs**. Tre serioza kaj ŝatinda samideano! Kaj tre sindona al nia afero.

Restas ankoraŭ unu apoga kolono en nia Sekcio. Kiu? Li estas mi! Sed ĉar pri si ne decas paroli bone, kaj malbone mi ne povas kaj eĉ ne volas, do mian personon mi lasas flanke.

B. Strelczyk.

Magistro de filozofio.

LASTMOMENTAJ SCIIGOJ.

(post fermo de l' numero).

Lublin. — Finiĝis plena 2-monata kurso de Esperanto gvidata de s-ro Cz.

Pruski, Del. de UEA. — Eskribiĝis la kurson 45 personoj, finis ĝin 25.

La 16. IV. okazis en Popollernejo nro XIII. jarkunveno de P. E. A. En la estraron estas elektitaj jenaj personoj: S-ro L. Leszczyński — Prezidanto, F-ino M. Dąbrowianka kaj S-ro E. Drzewiecki — Vicprezidantoj, S-ro St. Bekiesza — Kasisto, S-ro Cz. Pruski — Sekretario, S-roj St. Janowski, J. Gozdecki kaj A. Majewski — membroj de la Estraro, F-ino H. Olszówko — Bibliotekistino. — En la Revizian Komisionon eniris: Ing. Kopanicki, f-ino J. Pa-procka kaj s-ro B. Drzewiecki.

Korajn gratulojn kaj bondezirojn al nia estimata Prezidanto, S-ro K. Geršater kun edzino, pro l' naskiĝo de ilia filo, nomita honore al nia Maistro

LAZARO - LUDOVIKO

sendas

VILNA ESPERANTISTA SOCIETO
„UNIVERSO“.

Warszawa. En „Szkolna Gazetka ścienna“ nro 31 el 1. III. 1934 aperis artikoleto s. t. „Projekto pri enkonduko de Esp. en lernejon“. Ĝi informas la junaĝajn legantojn pri Esp., pri la okazonta konferenco en Wien kaj citas la nomon de nia s-ano Dro Czubyński, kiu siatempe iniciatis lernejan Esp. - propagandon.

Kraków. La projektita por Pentekosto kongreso de sud-ckcident-Pollandaj esperantistoj ne okazos. — La 27. V. Pollanda Esp. — Instituto aranĝas ekzamenon por Krakova kaj aliurbaj kandidatoj. Anoncu vin skribe kaj petu informojn: Kraków, Lubicz 34.

RECENZOJ.

Nova eldono de la sveda ŝlosilo.

De la sveda ŝlosilo aperis la 10-a eldono. 120 — 140 aj miloj. La naŭa eldono 20.000 ekz., elĉerpiĝis en unu jaro. Eldonanto estas Eldona Societo Esperanto. Stockholm, Svedujo, laŭ permeso de IKC. La prezo estas 0,10 sved. kr.

H. Seppik-Ernfrid Malmgren: **SISTEMA KURSO DE ESPERANTO**. Eldona Societo Esperanto, Stockholm, Svedujo. Prezo: sved. kr. 0.75.

La unua eldono de tiu ĉi lernolibro, 5.000 ekz., aperis en julio 1932 kaj elĉerpiĝis en 6 monatoj. Tio montras, ke la libro estas tre ŝatata. La dua eldono estas prilaborita de s-ro Malmgren.

Unualoke la libro estas verkita por rektmetodaj kursoj, sed ĝi enhavas gra-

matikajn klarigojn en sveda lingvo ŝufi-
ĉaj por memstudado. Krom la malalta
prezo la simpla kaj amuza teksto de la
libro estas kaŭzoj de la sukceso.

Paul Nylén **ESPERANTO - SVEDA
VORTARO**. Eldona Societo Esperanto,
Stockholm, Svedujo. 232 paĝ. Prezo:
broŝ. sved. kr. 3.75, bind. 5. —

La floriĝo de la esperantomovado en
Svedujo havis i. a. la sekvon, ke la
esperanto - sveda vortaro de G. H.
Backman, la mortinta esperantopioniro
sveda elĉerpiĝis. La gravan taskon de
ellaboro de nova vortaro ricevis la
Lingva komitatano kaj akademiano Paul
Nylén. Inter la svedaj esperantistoj li
estas la plej granda aŭtoritatulo. De-

post la jaro 1892 li partoprenis la espe-
rantolaboron kaj estis jam en la jaro
1896 kunredaktoro de Lingvo Interna-
cia, tiam eldonata en Upsala, Svedujo.
Por la esperantistaro sveda lia nun
eldoniĝa verko havas tre grandan valo-
ron, ĉar li majstras egale bone la sve-
dan kaj la esperantan lingvojn. Ne
nur la nun vivantaj esperantistoj sve-
daj, sed ankaŭ venontaj generacioj ĝuos
la fruktojn de la multjaraj studoj kaj la-
borejoj de s-ro Nylén.

Kiel ĉiuj eldonaĵoj svedaj, estas tiu ĉi
libro belege eldonita sur bonega pape-
ro, trege legebla. Estas vere modela
por aliaj eldonejoj. **B.**




D I S T R A Ĵ O J



Por ebligi al kiel eble plej multaj le-
gantoj de P. E. partoprenon en la enig-
mokonkurso, ni plilongigas la templimon
por sendo de l' unua parto da ili. Ni
akceptos la solvojn el la **IV** kaj **V** n-roj
de **P. E.** ĝis la **20-a de majo** k. j. La
enigmoj 4, 5, 6 valoras po 3 punktoj. Aŭ-
toro de l' enigmoj: s-ro **Bruno Reichberg**,
Riga, Latvio.


4. PIRAMIDENIGMO.



a, a, a, b, d, d, e, g, i, i, i, i, j, l, l, l,
m, m, m, n, o, o, o, o, o, o, p, r, r, s,
s, s, t, t, t, u.

La vorto en la meza vertikala vico
signifas: parton de la loĝejo; la vortoj
en la horizontalaj vicoj: literon, adverb-
on, meblon, sinsekvon de muzikaj sonoj,
mirigan homon pro eksterordinareco,
entuziasman sentimenton.

5. DIAMANT-ENIGMO.




a, a, a, a, b, b, b, b, e, e, e, e, e, f, g;
j, j, k, k, l, m, m, n, n, n, n, n, o, o, o,
o, o, o, o, o, o, r, r, t, u, u.

La vortoj en la mezaj diagonalaj vi-
coj signifas: nomon el Biblio; ene la ho-
rizontalaj vicoj: literon, trinkaĵon, me-
blon, ilon, nomon, manĝaĵon, beston,
ciferon, literon.

Onklino: Friĉjo, ne faru ĉiam tiel
malbelajn grimacojn. Foje restos tiel via
buŝo, kaj dum la tuta vivo vi restos
malbela.

Friĉjo (alrigardante la onklinon): Ĉu
ankaŭ vi faris grimacojn en via infan-
aĝo? (L. R.)

6. KOMBIL-ENIGMO.



a, b, b, b, d, e, e, e, e, i, k, k, l, l, m,
n, n, o, o, o, o, o, o; p; r; r; s; t; u.

La vortoj signifas: en la supra hori-
zintala vico (dorso) — monaton; en la
vertikalaj vicoj (dentoj) — mineralfor-
mon, korpopton, oston, meblon, pa-
rencon.

**Halina Weinstein, Warszawa, str. Leszno
99, m. 5. P. K. O. Nr. 27867.**

akceptas abonon por jenaj gazetoj:

Pola Esperantisto jare zł. 8.—; duon-
jare zł. 4.—; kvaronjare zł. 2.—, opa
numero zł. 0.70.

La Praktiko jare zł. 8.—; duonjare zł.
4.—, opa numero zł. 0.70. Abona jaro ko-
menciĝas en januaro kaj julio.

Literatura Mondo jare zł. 15.75; duon-
jare zł. 8.75; kvaronjare zł. 5.25; opa
numero zł. 1.75.

Heroldo de Esperanto jare zł. 26.—;
duonjare zł. 13.—; kvaronjare zł. 6.50.

Esperanto dla Wszystkich jare zł. 2.40;
duonjare, zł. 1.20; opa numero zł. 0.20.

Ondo de Daŭgava jare zł. 2.20; opa
numero zł. 0.20.

**Informoj de Esperanto-Asocio de Esto-
nio** jare 2.20; opa numero zł. 0.20.

Nur ĉe mendo de unuopaj numeroj al-
donu por poŝtelspezoj 10%, minimume
zł. 0.10. Aĉeteblaj ĉiuj eldonajoj de Li-
teratura Mondo, La Praktiko kaj Pola
Esperantisto. Sendante monon, bonvolu
indiki la celon de la enpago. Por kores-
pondado bonvolu aldoni poŝtmarkon.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie
zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. ro-
cznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer
pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony
zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja:
małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34.

KONTO P. K. O. NR. 406.66)

KURS KORESPONDENCYJNY
JEZYKA ESPERANTO.

Sekcja Esperanca Polskiego Touring
Klubu prowadzi kurs Esperanta drogą
korespondencji. Kurs polega na tem, że
uczestnik jego otrzymuje podręcznik je-
zyka Esperanto, podzielony na 12 lekcji,
przerabia co tydzień (lub częściej) jedną
lekcję, tłumaczy ćwiczenia z Esperanta
na polski i odwrotnie, poczem przesyła
je do poprawienia.

Aby zostać uczestnikiem kursu, należy
wpłacić zł. 15.— (ewentualnie w dwóch
ratach: zł. 10.— przy zapisie, zaś resztę
po czwartej lekcji). Opłata ta obejmuje
całość kursu wraz z samouczkiem, po-
prawą przerobionych ćwiczeń i przesył-
kami pocztowymi.

Zapisywać się może każdy i w każdym
czasie.

Ćwiczenia (przesyłane w zeszycie) na-
leży kierować na adres Sekcji Esperanc-
kiej Polskiego Touring Klubu (Warszawa,
ul. Kredytowa 5), zaś opłatę na konto
Polskiego Touring Klubu w P. K. O.
12563 z zaznaczeniem na jaki cel.

ESP. RADIOPRELEGOJ

en polaj stacioj en **majo 1934: 9. V.**
Dro St. Lempicki: Pola spirita kulturo
en la lasta jarcentkvarono. **23. V.** Dro
W. Goetel: Rezervaĵoj kaj naciaj parkoj
en Polujo. Ambaŭ je la 22 h. ĝis 22 h.
20 m.

POST LA PRELEGOJ NEPRE DAN-
KU LA DIREKCION!

Je la 2-a poŝtagmeze: Du skotoj sin
banas en la maro.

Je la 2-a kaj 10 minutoj: Unu vetas
sспенcon, ke li restos sub la akvo pli
longe ol la alia.

Je la 2-a kaj 20 minutoj: Il: subakv-
iĝas.

Je la 10-a vespere: La policianoj an-
koraŭ serĉas ilin.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por
societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł.
6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero
zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.—
1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto
de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

K U P O N O N-R O 2
P O R
I I I E N I G M O K O N K U R S O .